

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2013

Ĵaŭdon la 11an de aprilo

61a jaro

Kalendaro

ATENTU: Ni ŝanĝis la kunvenhoron! La kunvenoj komenciĝos je la **18a**

Lundon la 15an de aprilo (semajno 16) – mandag

Kjell Peder Hoff rakontos pri la tradicia Printempa Seminario Internacia (PSI) en Germanio, kie li partoprenis en la pasko. kun ekskurso al Herzberg (la “Esperanto-urbo”).

Kjell Peder Hoff forteller om det årvisse familiearrangementet i Tyskland, der han deltok i påsken, med utflukt til Herzberg (“die Esperanto-Stadt”).

Lundon la 6an de majo (sem. 19) – mandag

Klimata elekto (*Klimavalg*). Kvardeko da organizoj subtenas tiun kampanjon por plia atento pri la klimata krizo ĉe la aŭtuna parlamenta elekto.

Enkondukos Kristoffer Haug.

Klimavalg. Et førtitalls organisasjoner støtter denne kampanjen for å få øket oppmerksomhet om klimakrisen ved årets stortingsvalg.

Kristoffer Haug orienterer.

Lundon la 3an de junio (sem 21) – mandag

Dek unu tagojn antaŭ la Landa Kongreso ni diskutos la proponojn kaj planojn por la landa kunveno kaj, kiel aranĝanta klubo, preparos praktikajn aferojn.

Elleve dager før landsmøtet diskuterer vi forslagene og planene som legges fram for Forbundets generalforsamling og, som arrangerende klubb, forbereder det praktiske.

Lundon la 17an de junio (sem 23) – mandag

Resumo kaj pritakso de la Landa Kongreso.

Oppsummering og evaluering av landsmøtet, sett fra vår side.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma flankstrato.

OKAZIS

Lundon 21. januaro (sem. 4)

Kia la nova strategia plano de NEL 2013 – 17? Post la akcepto de la antaŭa, en 2009 la eksteraj kondiĉoj ŝanĝiĝis – i.a. plipopulariĝas la angla – kaj ankaŭ la internaj: ni ĉiujare perdas membrojn.

Ne havante fortojn por povi efike labori pri ĉiuj bezonoj, ni ĉie alfrontas la demandon: Al kio doni prioritaton? Ekz-e pri informado: ĉu al studentoj, administristoj aŭ politikistoj? Kaj pri instruado, ĉu pli grave ol doni bazajn lingvosociojn al novuloj estas kapabligi kernan grupon de jamaj membroj stabile mastrumi la organizajn taskojn? Kaj ne nur la internajn: ni bezonas ankaŭ homojn kiuj kapablu aktive ekspluati la socialajn retejojn.

Lundon 4. februaro (sem. 6)

La anoncitan temon (*Klimavalg*) ni devis prokrasti ĝis alia fojo, sed ĉar neniu el la ĉeestantoj partoprenis en la perskajpa* seminario de NEL sabaton, Douglas faris ripetitan prezenton de sia prelegeto pri komputilaj terminoj.

*Skajpo (Skype): senpaga perkomputila telefono

En tiu ĉeesta kunveno ĝi provokis multe pli da demandoj kaj diskuto ol en la skajpa seminario.

Lundon 18. februaro (sem. 8)

Kim Keyser gvidis nin tra la historio de anarĥiismo en Eŭropo, kaj ni konstatis ke niaepoke kaj la anarĥiismon kaj la Esperantomovadon favoras la evoluo de Interreto.

Lundon 4. marto (sem 10)

Jarkunveno de la klubo. Ni detale traktis la jarraporton. Al la jarkalkulo ni povis aldoni precizigojn pri unu ŝuldo kaj unu bonhavo. (Vd. cetere p.3)

Lundon 18. marto (sem 12)

La nova strategioplano de UEA estas ampleksa dokumento, kiu rezultas de funda repensado pri la celoj, agado kaj rimedoj de la organizo. Revolucie estas ke ĝi – almenaŭ la versio de marto 2012 – deklaras ke la komunumo estas "iusence la kerno de la tuto", Douglas koncize klarigis pri la kvar laborkampoj konsciigo, kapabligo, komunumo kaj kunordigo kaj la proponataj novaj komisionoj.

Al Kopenhago?

La nova **prezidanto de la Kopenhaga E-klubo** proponas pli proksimajn rilatojn inter niaj du kluboj, kun intervizitoj. Kiuj interesiĝas ekskursi al Kopenhago?

Juan Carlos (Havano, Kubo) membriĝis en nova junulara E-klubo tie kaj proponas retroŝte interŝanĝi fotojn, poemojn, kanzonojn kaj raportojn pri E-eventoj. Lia retroŝta adreso: <juancarlos[a]esperanto.co.cu>.

Koncize el la jarkunveno, 4. marto 2013

Jarraporto 2012: aprobita kun korektetoj kaj aldonetoj.

Jen la plej gravaj korektoj kaj aldonajoj al la versio dissendita 27/28. februaro:

[sub A. Ekstera agado:] Jubileo 125, ne 150 jaroj.

Aldoniĝu:

Cato Haugen ekhavis la oficialan rajton ĉiĉeroni en Esperanto pri Oslo.

Aliaj rajtigigitaj ĉiĉeronoj en Esperanto: Kari Kalsås, Tamiko Kaŭakami.

[sub B. Interna Agado:]

Kluba Bulteno: Aperis 4 fojojn kun 4 paĝoj (ne pagoj)

[sub C. Administrado:]

Ekzamenoj. Instruista: ne 1 sed 2,

Membroj: Tiuj kiuj pagis 2012-kotizon ĝis 3. marto 2013 (antaŭ la jarkunveno) estas en la membrostatistiko 2012. Poste pagis unu plia (ordinara membro).

La monkkalkulo 2012.

Neta kosto de kopiado: 250 kr (alian kopiadon kovris la Legaco Uhlen).

La klubo ŝuldas por plurjara kopiado al NEL (ne indikita en la kalkulo).

Douglas D. kalkulos kiom da mono kaj informos Harald R. [Ni taksas 1 000 kr.]

Ni ne ricevis revizoran raporton, sed ni povas akcepti la jarkalkulon kondiĉe ke li ne havos rimarkigojn.

Alia el la jarkunveno

Ricevita propono: Prezentiĝis propono de la estraro redukti la konsiston de la estraro de minimume 5 (kun vicprezidanto kaj du sekretarioj) al minimume 3 (prezidanto, sekretario kaj kasisto), maksimume 7. Ĉar mankas kandidatoj por plenigi la estraron laŭ la ĝisnuna statuto, la propono estis unuanime akceptita.

La rezultajn statutŝanĝojn vi povas vidi en *Kluba Bulteno* 1/2013.

Elekttoj. Ni aprobis la proponojn de la elekta komisiono (Otto Prytz) reelekti jene

Prezidanto: Kjell Peder Hoff

Kasisto: Harald Rygg

Sekretario: Douglas Draper

Cetera estrarano: *Kristoffer Haug

Anstataŭantoj: 1. Otto Prytz , 2. *Birgit Solberg

Revizoro: Terje Meier (reelekto) Vicrevizoro: *Filip van Laenen

→

* konfirmotaj

→

Elekta komisiono: Prokrastita.

Ni sendas la reviziitan **jarraporton** kaj la ŝanĝitan **statuton** retroŝte al tiuj kies retadresojn ni havas. Al **aliaj membroj kiuj petos ilin** ni pretas sendi papere.

Info-budoj en foiroj?

Bonan okazon renkonti la publikon kaj informi pri Esperanto donas inform-budoj en foiroj, konferencoj kaj festivaloj, sed ili ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en loka biblioteko. Se vi vidos / aŭdos pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter!

En la vendobretaro

Lærebok for nybegynnere: Esperanto – den direkte metoden – basert på tegninger, av Stano Marček. Fotnoter og forklaringer på norsk. Egner seg ypperlig for selvstudium. 2007 **norsk utgave 2012**. 116 s. **45 kr**. K-disko 80 kr.

Kalevala. La fama finna nacia epopeo, 392 p. 22 cm Ilus. Malmole bindita. 90 kr.

Michael Ende: **La senĉesa rakonto**. 364 p. Malmole bindita. 175 kr.

Karolo Darwin: **La Origino de Specioj** 430 p. 180 kr.

Esperanto – över 50 miljoner träffar. [Nun > 170 milionoj!] Lars Forsman rakontas el siaj spertoj pri instruado al lernantoj el la tuta mondo dum 18 jaroj en la popolaltrernejo de Karlskoga. Amplekse ilustrita. 95,- ĉe la Oslo-klubo.

T-ĉemizoj ("Esperanto er kult"; "Esperanto la internacia lingvo"; "Vi snakker esperanto") 100 kr. **Glumarkoj** 2 kr.

Stokoj de ĉi ĉiom en la klubejo; ankaŭ de vortaroj, gramatikoj, literaturo.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.

Tlf. 22 35 08 94

www.esperanto.no/oslo

Retpoŝto: <[oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)>

Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper